



AMERIKA

ESPERANTISTO

E



M. MAROVIAN

FEBRUARY, 1928

CONTENTS	Page
Club Directory	2
Vintraĵ Revoj	5
Ĝi serĉas poŝtmarkon.....	5
En Kaptilo, Rakonto	6
Diversaj Tipoj de Kongresanoj.....	8
Kiel Ni Devas Trakti Nian Lingvon?.....	9
North American News Items.....	10
How to Start and Keep Going an Esperanto Group....	12
Kial Ni ankoraŭ ne havas la deziritan sukceson pri la propagando?	13
E. A. N. A. Officers and committees.....	14
Advertisements	14-15

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, INC.

A propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

Classes of membership: 1. Life members \$100. 2. Sustaining members \$10. 3. Contributing members \$3.00. 4. Regular members \$2.00. These four classes include Amerika Esperantisto. 5. Regular members without Amerika Esperantisto \$1.00.

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.
Group Charter—\$1.00.

JERSEY CITY, NEW JERSEY

Esperanto Eduka Klubo
578 Jersey Ave., Jersey City, New Jersey.
Miss Sophie Schwartz, Sec. Classes for children every Wed. from 6.30 to 8; for adults from 9 to 9.30; Mrs. Julia Goldzier instructor. Barco every 2nd Saturday of the month.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleja Esperanto Rondo.—Hilda F. Mills, Secy., 18 Northampton Ave., Berkeley, Calif. Meets Saturdays 7.30 P. M., Meeting House of Society of Friends.

SAN FRANCISCO, CALIF.

Esperanto Association of California, Inc.—Rooms 309-311 de Young Building, San Francisco. Miss L. J. Marshall, Sec.

DENVER, COLORADO

Denver Esperanto Society meets Wednesday at 8.00 P. M., Room 2, 1310 Welton Street. W. A. Buchheim, Sec., 1435 Race St.

WASHINGTON, D. C.

Kolumbia Esperanto Asocio, and class, Thursdays, 8.30 P. M.—706 11th St., N. W. Apt. 53.

ST. PETERSBURG, FLORIDA

Amikeco Rondo meets Tuesdays 4.00 P. M., Fridays 8.00 P. M. E. E. Owen-Flint, Sec. Tea Room, Suwanee Hotel.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata No. 1 meets at 1500 Cullerton Ave. Vac. Popela, Sec., 1657 W. 19th St.
La Gradata No. 2 meets at 365 W. Madison St. F-ino L. M. Stanton, Sec.
La Gradata No. 3 meets at Ridgeland & 26th Place. John Knotek, 2614 S. Kenilworth Ave., Berwyn, Ill.
Konsilantaro meets at 365 W. Madison St. Sec. F-ino M. Simonek, 1500 Cullerton Ave.

ROCKFORD, ILLS.

Amerika Esperanto-Instituto, 602 7th St. Kunvenoj la unuan kaj trian dimacon je la 10a horo.

TOPEKA, KANSAS

Topeka, Kansas Esperanto Association. Rev. J. H. Fazel, World Delegate, Prez. Capt. Geo P. Morehouse. Vice-Prez. Mr. Warren Davis. Sek-ino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St.

BOSTON, MASS.

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. Miss M. Butman, Secretary.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 2916 East Grand Blvd.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M. to 9 P. M. except Tuesday and Friday. Classes meet Tuesday and Friday, 8.10 P. M.
La Pola Esperanto Asocio.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

MINNEAPOLIS-ST. PAUL

Twin City Esperanto Club, meets for dinner and program 6:30 p. m. 1st Tuesday in each month at Minn. Union Bldg., University of Minnesota. Charles W. Barnes, Secretary, 1001 Commerce Bldg., St. Paul, Minn.

NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society.—Catherine M. Healy, St. Paul's Place. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Avenue.

WEEHAWKEN, N. J.

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

CLEVELAND, OHIO

Cleveland Esperanto Society, Main Public Library. Meets at 7.30 P. M. first and third Wednesdays of each month. S. Kosminski, Sek., 3406 Mayer Ave. *

PHILADELPHIA, PA.

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Sec'y. West Phila. High School for Boys. Monthly meeting for business every fourth Friday at Y. W. C. A., 18th and Arch Sts., 8:15 P. M. Social and class meetings on same hour and place on other Fridays. Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Deligitito de U. E. A.).
Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

MILWAUKEE, WISCONSIN

Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M. Esperanto Club of Milwaukee, J. R. Williams, Pres., 718 Buffum Street; S. Lilwin, Sect., 671—14th Avenue.

MADISON, WISCONSIN

Esperanto Office, 119 W. Main Street.

Amerika Esperantisto

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Post Office at St. Paul, Minn., under the Act of March 3, 1879.

Published on the 5th day of each month by
THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA
 1001 Commerce Bldg. St. Paul, Minn.

One Dollar a Year

PUBLISHERS E. A. N. A.

Editor J. J. BURITA
 Associate Editors..... PAULA E. PARRISH, GEO. W. LEE
 Business Manager CHAS. W. BARNES
 Office of Publication...1001 Commerce Bldg., St. Paul, Minn.

Vol. 39

FEBRUARY, 1928

No. 4

E. A. N. A. RECEIVES GIFT OF \$500

Our readers may recall that the late L. D. Stockdon of California bequeathed certain sums of money to various Esperanto Societies. The bequest was contested in court by certain heirs. The societies lost in the lower courts but a compromise was recently effected by which E. A. N. A. receives \$500. The suit was handled for E. A. N. A. by Brewster F. Ames, of San Francisco. Mr. Ames will give a more extended history of this bequest in a future issue of A. E.

OTHER CONTRIBUTIONS RECEIVED. We publish here the contributions received in response to the recent request of the Finance Committee. The Committee asked for \$500 to be contributed to the association as an organization fund and a loan of \$500 to the book fund. In pursuance of this plan the following contributions have been received:

	Org. Fund	Book Loan Fund
Berthold Schmidt, 12 E. 41st, New York.....	3.00
Fred H. McMann, 2716 Decatur Ave., Bronx, New York	3.00
Alfred D. Dennisen, Johnstown, N. Y.....	5.00	5.00
Ivar R. Ekstrand, Box 625, Ostrander, Wash.....	1.00
Mrs. Lillian E. Fuller, 98 South St., Framingham, Mass.	5.00
James F. Morton, c/o Public Lib., Paterson, N. J.....	5.00
Rev. John H. Fazel, 625 Buchannan St., Topeka, Kan.	5.00	100.00
Julian E. Fast, Box 123, Delphos, Ohio.....	10.00
E. L. Southwick, Pawtucket, R. I.....	2.00
Edwin Sievers, 2016 W. Alexander Ave., Detroit, Mich.	1.00	1.00
A. S. Vinzent, 400 California St., San Francisco, Calif.	7.50
John D. Hailman, 7010 Penn Ave., Pittsburg, Pa.....	20.00	10.00
F. G. Cottrell, 3904 Ingomar Ave., Washington, D. C.	20.00	20.00
Carroll A. Holbrook, County St., Medfield, Mass.....	5.00	5.00
Mrs. Daniel B. Way, Rt. No. 2, Waterford, Pa.....	1.00
James A. Whitcomb, New York, N. Y.....	5.00	5.00
Dr. F. H. Batty, c/o State University, Iowa City, Iowa	5.00
L. P. Hadley, Anita, Iowa.....	10.00
Chas. S. Taylor, Haverford, Pa.....	25.00
Miss Mattie Wadsworth, R.F.D. No. 8, Hollowell, Maine	3.00
W. L. Person, Stuart, Okla.....	5.00
Henry W. Hetzel, 4515 Windsor Ave., Philadelphia, Pa.	5.00	5.00
Howard B. Frost, 270 Linwood Pl., Riverview, Calif.	1.00
Richard Ashman, 376 Mellander St., New Orleans, La.	2.00	2.00
Prof. Edwin L. Clarke, Oberlin College, Oberlin, Ohio	10.00
John C. Bley, 4017 Lake Park Ave., Chicago, Ill.....	10.00

Several of the above contributors have also paid dues as sustaining members and the constitution of the Association requires that the names of sustaining members shall be published in A. E. That will be done in another issue as we shall

probably publish names of all members unless we receive sufficient protest to indicate such a policy is not generally approved by the members.

In making notice of contributions to the Association we should not omit to mention the fact that D. E. Parrish, 109 Fordham Drive, Buffalo, N. Y. furnishes every month free to the Central Office the envelopes already addressed for mailing out A. E. We do not know just what this costs Mr. Parrish, but we know that this contribution saves the Association quite a few dollars each month. Also in this connection mention should be made of the free services given by the Publications Committee in editing A. E.

The two special funds should be completed as speedily as possible. Unless we have sufficient capital to carry a stock of books adequate to our needs we should turn the book business over to a private book company. Doing business on too small a scale is unprofitable. There is a great deal more book business than we are getting but there is little use in seeking business which we are unprepared to accommodate. We have advised that \$400 of the funds received from the Stockton legacy be placed in the book fund but even with this addition will not be in any measure adequate without the completion of the proposed book fund.

—CHAS. W. BARNES, Sec.

APPLICATION FOR MEMBERSHIP

Please enroll me as.....member of E. A. N. A. in the class of membership indicated.

Classes of membership in E. A. N. A.: 1. Life members \$100. 2. Sustaining members \$10. 3. Contributing members \$3.00. 4. Regular members \$2.00. These four classes include Amerika Esperantisto. 5. Regular members without Amerika Esperantisto \$1.00.

If you have already paid your dues for this year fill out the membership blank and mark it paid. If you wish to change to another class the dues already paid will be credited on the new class.

SUBSCRIPTION TO THE ORGANIZATION FUND

I hereby subscribe to the Organization Fund the sum of \$.....for this Congress year. I enclose \$.....and will pay the sum of \$.....on the.....day of....., 1928, and \$.....on the.....day of....., 1928.

SUBSCRIPTION TO THE BOOK FUND LOAN

I hereby subscribe the sum of \$.....as a loan to the Book Fund. I herewith enclose the sum of \$.....and will pay the sum of \$.....on the.....day of....., 1928, and the sum of \$.....on the.....day of....., 1928.

Date..... Name.....
Post Office..... Street or Route.....

SPRITAJO

Rabisto haltigas sinjoron K. "La monon aŭ la vivon!"
La rabisto konsentas. "Pafu truon tra mia ĉapelo."—La rabisto faras tion. "Kaj ankaŭ tra lagantoj."—La rabisto pafas dufoje. "Kaj tra la naztuko." "Nun mi ne plu havas kuglon." "Mi bedaŭras," diras sinjoro K., forirante, "tiukaze mi ne povas doni al vi monon."

VINTRAJ REVOJ

Forflugis belaj tagoj,
Alvenis vint' al ni.
Kovriĝis ree lagoj
Brilanta per glaci'.

Forflugis tempo gaja,
Sopiras ni sen fin',
Sed ĉu beleco Maja
Forlasis tute min?

Ne. Kredas ni—revenos
Printemp' kaj ĝoj' al ni,
Kaj lagojn malkatenos
De varma sun' radi'.

Fajfegas vent' ribela,
Sur teron falas neĝ'.
Sovaĝa kaj malbela
De vintro regas Reĝ'.

Sed ĉu regardo lia
Sen fino ŝarĝos nin?—
Ne. Venos temp' alia—
Printempo—Belulin'.

En sia verdornamo
Revenos ĝi al ter',
Ekregos ree Amo
Kaj iros for—mizer'.

Ni gajaj kaj liberaj
En nia frata rond'
Kantados pri mistera
Vekiĝ' de tuta mond'.

Printempon ni kantados
Ĝin ekglorigos ni,
Dum koroj varmigados
De hela sun' radi'.

—GEORGE DESKIN.

SI SERĈAS POSTMARKON

Ŝi ankoraŭ neniam forsendis leteron, kaj tial ŝi venis al la fenestro de la markvendiŝto kun la sama mieno, kiun ŝi havus enirante magazenon.

“Mi deziras vidi kelkajn poŝtmarkojn, mi petas.”

“Kiun valoron vi deziras?”

“Valoron?”

“Jes, ĉu ĝi estas por letero aŭ ĵurnalo?”

“Ho, mi volas sendi leteron al mia Onklo Johano; li ĵus transloĝiĝis al—”

“Do vi bezonas du-cendan markon,” diris la vendiŝto, donante al ŝi unu tian.

“Mi ne ŝatas tiun koloron.”

“Tiu estas du-cenda marko, sinjorino. Bonvolu flankeniri, kaj permesu al la sinjoro post vi alproksimiĝi.”

Sed ĉu vi ne havas ilin en alia koloro? Mi neniam ŝatis tiun nuancon de ruĝo.”

“Estas nur unu koloro.”

“Tio estas stranga. Ŝajnas al mi, ke vi devus havi ilin en diversaj kolornuancoj, por ke oni povu fari elekton. Ĉu vi estas certa ke vi ne havas ilin pli helruĝaj, aŭ eĉ en alia koloro—Nil-verda, aŭ fok-bruna, aŭ jubile-blua, ekzemple?”

Vi rajtas meti du unu-cendajn markojn sur via letero se plaĉas al vi.”

“Montru ilin al mi, mi petas. Ha, tiu ĉi estas sufiĉe bona. Mi multe preferas tiun koloron. Mi prenos unu, se plaĉas al vi.”

“Se ĝi estas por via letero vi bezonas du. Ĉi tiuj estas unu-cendaj markoj kaj leter-afranko estas po du cendoj por ĉiu unco.”

“Ho, mi ne volas meti du markojn sur mia letero; laŭ mia opinio ili kune ne aspektus belaj.”

“Estas necese pagi du cendojn por porti unu leteron, sinjorino, kaj vi devas aŭ surmeti unu du-cendan markon aŭ du unu-cendajn. Ĝi ne iros sen ili. Mi devas peti vin rapidi, ĉar vi malebligas al multaj homoj veni al la fenestro.”

“Tio estas stranga. Mi ne ŝatas la aspekton de du markoj kune. Ĉu vi estas certa ke la alia marko ne estas havebla en fok-bruna, aŭ....”

“Ne, sinjorino; ne!”

“Do mi devas serĉi aliloke.”

Kaj ŝi foriris.

El Angla Lingvo Tradukis,
LEHMAN WENDELL.

Lerta respondo

Juna knabino en lernejo forgesis meti punkton super la litero i. “Kie estas la punkto super via i?” demandis la instruistino. “Ĝi ankoraŭ estas en la krajono,” estis la respondo.

EN KAPTILO

Rakonto de Sidor Kocma

Laŭ profesio, mi estas arĥitekturisto. Antaŭ kelkaj tagoj unu el miaj amikoj, kuracisto-psikiatro, skribis al mi la jenan leteron:

“Kara amiko! En mia malsanulejo, dank’ al Dio, estas tia amaso da pacientoj, ke mi ne scias, kien ilin lokigi, kaj tial, mi estas devigata pligrandigi la konstruaĵon. Bonvolu viziti min en unu el la plej proksimaj tagoj; venu al tagmanĝo, por ke ni povu libere preparoli, kiel kaj kion konstrui. Ĝis la revido. Via fidela, k. t. p.....”

Post tri tagoj mi sonorigis ĉe bela, ornamita vilao, kie loĝis mia amiko; ĝi estis apartigita de malgaja konstruaĵo de psikiatria malsanulejo per ombroplena ĝardeno.

Ĝis la tagmanĝo ni esploris la lokon kaj pririgardis de ekstere la pligrandigotan konstruaĵon. Poste ni revenis en allogan loĝejon de la doktoro, kie nin atendis la gastama mastrino kun bonega tagmanĝo. La pladoj kaj boteloj estis rapide malplenigitaj kaj la interparolado fariĝis ĉiam pli viveca.

La profesio de mia amiko vekis en mi grandan intereson; li lerte elektis el sia praktiko tion, kio estis komprenebla al simpla mortemulo. En la interparolado, li ankaŭ ektuŝis la demandon pri tio, kiel malfacile estas altiri la frenezulon en la malsanulejon kaj kiom da ruzeco en tiaj okazoj estas necesa al kuracisto.

— La plimulto de malsanuloj teruriĝas ĉe la penso, ke ili iros en la malsanulejon,—diris mia amiko,—uzadi la perforton estas tre malutile, ofte eĉ danĝere, kaj tial la kuracisto devas elpensi milojn da ruzaĵoj por venigi malsanulon en tiun ĉi malgajan institucion, kie li estos ĉirkaŭita per speciala kaj taŭga flegado. Tamen, plena resaniĝo okazas tre malofte. Unu dentiston, malsaniĝintan je danĝera psika animkonfuziĝo oni neniel sukcesis venigi ĉi tien; tiam, mi invitis lin al unu mia paciento, malsana je dentdoloro. Tute ne protestante, li kunmetis siajn ilojn kaj forveturis kun mi. Mia ruzo bonege sukcesis. La malsanajn advokatojn mi invitas sub preteksto de grava proceso, kiun mi kvazaŭ deziras komisi al ili; la pastrojn mi petas komunii la mortantan malsanulon

“Diablo prenu, — mi pensis, dum la doktoro estis konfidanta al mi siajn strategiajn metodojn, — kaj la arĥitekturistojn li verŝajne invitas sub preteksto de konstruadoj?....”

Mi ektuŝis per la mano la kapon kaj trankviliĝis, pensante, ke mi estas tute normala kaj efektive invitita por konstruado.

— Vi ne povas imagi al vi, — daŭrigis mia amiko, — ĝis kia grado tiuj ĉi malfeliĉuloj estas certaj pri ilia plena sano kaj normaleco; ili eĉ ne suspektas sian staton.

Al mi fariĝis iel strange. Kio okazos, se mi ankaŭ estas en simila stato?

— Antaŭ nelonge, — daŭrigis la doktoro sian rakontadon, — mi havis aferon kun juna aristokrato. Li estis neniel trompebla. Fine mi decidis inviti lin al tagmanĝo. Li venis kaj sidis ĝuste sur la sama loko, kie vi sidas nun. Post la tagmanĝo, mi proponis al la juna homo rigardi la malsanulejon kaj montris la izolitajn ĉambrojn. En unu el ili, mole drapirita, mi rapide fermis la pordon kaj tiamaniere kaptis lin.

Kun maltrankvileco mi ekmoviĝis sur la seĝo, sur kiu, kiel mi ĵus estis aŭdinta, ankoraŭ sidis antaŭ nelonge la frenezulo. Povas esti, ke ankaŭ hodiaŭ ripetigos la samo. Sed mi rapide forpelis de mi tiujn malsaĝajn dubojn. Neniu el miaj antaŭuloj suferis la animkonfuziĝajn malsanojn, kaj tiuj ĉi estas ordinare heredebaj. Ne, ne, tiu ĉi invito ne estis preteksto, por min altiri, oni efektive bezonas min, kiel arĥitekturiston.

* * *

Post la tagmanĝo, la doktoro proponis al mi rigardi la malsanulejon; ĝi min tre interesis kaj, ĉar mi hontis eĉ ŝerce esprimi mian timon, mi tuj konsentis.

Ni iris en la malsanulejon, vidis ĉirkaŭ kvindek ĉambrojn kaj ĉirkaŭ cent kvindek malsanulojn. Nek en unu ĉambro, dank’ al Dio, oni min ŝlosis, ĉar mi atentis je tio, ke la doktoro estu ĉiam je kelkaj paŝoj antaŭ mi.

Fine ni eliris el la konstruaĵo de malsanulejo. Kiam mi transpaŝis ĝian sojlon kaj ekspiris freŝan aeron, min ekregis feliĉa konscio, ke mi estas psike sana.

Ni ne estis ankoraŭ foririntaj kelkajn paŝojn kiam mi rimarkis, ke en unu el la ĉambroj mi forgesis mian novan silkan pluvŝirmilon. Mi eĉ rememoris, en kiu ĉambro mi ĝin lasis, kaj mi diris al la amiko, ke mi devas reveni.

— Bone, bone, iru, la servistoj helpas vin trovi la pluvŝirmilon, — diris la doktoro, kaj mi ekkuris sur ŝtuparo, transsaltante po kelkaj ŝtupoj.

El supro mire rigardis min unu servisto.

— Akompanu tiun ĉi sinjoron, — ekkriis al li la doktoro, montrante min.

La servema malsanulisto tuj iris post mi, montrante al mi, kun ia stranga afableco, la vojon.

— Ĉi tien, ĉi tien, bona sinjoro, pli maldekstren... jen tien!

Mi haltis por pli bone vidi tiun ĉi strangulon.

— Iru do antaŭen, mia karulo, — mi diris al li, — kaj serĉu mian pluvŝirmilon.

— Certe, certe, ni serĉos la pluvŝirmilon, kara sinjoro. Mi iros antaŭe... kaj vi iru post mi.

Mi rimarkis, ke la servisto faris ian signon al sia kolego.

La unua servisto ekiris antaŭe, kaj la dua, kiun li alvokis, — malantaŭe.

Mi haltis.

— Vi, ŝajne, imagas al vi, ke mi estas frenezulo? Mi faros ne eĉ unu paŝon antaŭen. Serĉu mem mian pluvŝirmilon, aŭ diablo ĝin prenu!

Dirinte ĉi tiujn vortojn, mi turniĝis por reveni al la amiko kaj plendi je la malsaĝaj servistoj; sed en la sama momento mi eksentis, ke oni min kaptis kaj renversis sur la plankon.

— Malkvietulo! — ekkriis ambaŭ servistoj, kaj ankoraŭ kelke da homoj ekrapidis por helpi ilin.

Mi penis por forliberigi min, kriis, piedbatis kaj unogratis ilin, sed vane. Ses servistoj levis min, kiel pilkon, kaj forportis en la mole drapiritan ĉambron. La ŝlosilo dufoje turniĝis en la seruro kaj mi restis sola en la ĉambro por malkvietaj malsanuloj.

Mia malespero estis senlima. Ĉu efektive mi estas frenezulo? Mi komencis rememori la plej bagatelajn detalojn de mia vivado dum lasta tempo. Sed, malgraŭ ĉiuj miaj pensoj, nenion suspektan mi povis ekrememori. Ne, milfoje ne, mi ne estas frenezulo!

Sed, se mi estas sana, kial do mia amiko ne venas al mi? Li certe rimarkis, ke mi jam de longe ne revenas.

En la pordo de la ĉambro estis malgranda truo, tra kiu min senĉese observis ies okuloj; evidente oni gardis, ke ne faru al mi ian malutilon.

Fine la pordo malfermiĝis, eniris ia tre ĝentila juna kuracisto kaj afable petis, ke mi pruntu al li mian poŝan tranĉilon.

Tio estis terura impertinenteco! Ili opiniis, ke mi estas min vundigonta! Mi komencis konsideri. Se mi ne donos la tranĉilon, ili opinios min tre malsana kaj eble forprenos ĝin perforte. Pripensinte, mi malestime ĵetis la tranĉilon al la piedoj de la kuracisto.

— Trankviliĝu, — li diris paceme, — mi donos al vi ian trankviligan kuracilon.

— Prenu ĝin kaj manĝu mem kaj por mi venigu la ĉefan kuraciston, al kiu mi estas veninta ĉi tien, kiel gasto.

— Certe, certe, vi estas nia gasto! Trankviliĝu, mi petas; tio estas la plej bona por vi. La direktoro ne povas tuj veni al vi; lin oni invitis al unu mortanto. Sed li certe vizitos vin, kiam li revenos.

Mi restis du horojn malliberigita.

Fine, post la pordo mi ekaŭdis laŭtan ridon, interrompitan de insultado; evidente mia amiko rapidis kun helpo. Li insultis la servistojn, sed li ne povis deteni sin de rido.

Larmoj de rido aperis en liaj okuloj, kiam li estis malferminta la pordon kaj ĉirkaŭpreninta min je kolo, kun senfinaj petoj pri pardono.

— Mi volonte pardonas vin, — mi diris malvarme, — vi ja ne estas kulpa, sed nun, mi petas, ellasu min, kiel eble plej baldaŭ.

Per rapidaj paŝoj mi malsupreniris, ne demandinte eĉ pri mia pluvŝirmilo kaj tranĉilo.

Mia amiko, petante pri pardono, kuris post mi.

— Diru, mi petas, kiam vi venos fari kontrakton rilate al la konstruado? — li demandis.

— Neniam!

Plu mi ne povis vidi tiun domon.

Esperantigis

KAROLO NIEVENGLOVSKI.

DIVERSAJ TIPOJ DE KONGRESANOJ, KIUJN ONI RENKONTAS EN NIAJ KONGRESOJ

La verda kongresano, esperante vestita, kun verdaj steloj sur la ĉapela rubando, verdaj steloj sur la poŝoj de l' jaketo, verdaj steloj sur la tuta veŝto. Li havas verdajn flagetojn sur la ĉapelo, verdajn flagetojn en ĉiuj butontruoj de la jaketo; li purigas sian nazon (abomeno!) per malgranda esperanta flago. Ĝenerale li estas vegetarano kaj manĝas nur verdajn legomojn.

La bonhumora kongresano, ĉiam ridanta, ĉiam kontenta. Li venis al la kongreso por amuziĝo, kaj li amuziĝas. Li ĝojas, kiam brilas suno, li ankaŭ ĝojas, kiam falas pluvo. Li gratulas ĉiun, aplaŭdas post ĉiuj paroladoj, havas ĉiam saman opinion, kiel lia kunparolanto. Li estas kontenta pri la manĝo, kontenta pri la ĉambro, kontenta pri la puloj (ĉar ekzistas ankaŭ kongresaj puloj.)

La malbonhumora kongresano, ĉiam malgaja, ĉiam kritikanta. Tuj de la alveno li kritikas kaj plendas. La donitan loĝejon li trovas abomena, li postulas tuj alian. Kiam la ŝanĝo estas farita, li sopiras je la unua. En la kunvenoj li plendas, tial ke lia sidloko estas tro malproksima, ke la oratoroj tre mallaŭte parolas. Se la parolado estas longa, li plendas, tial ke oni diras neutilajn vortojn; se la parolado estas mallonga, li plendas, tial ke la oratoro petis parolon por nenion diri. Ĉiam kaj ĉie la bonhumora kongresano malfermas la buŝon nur por diri malagrablajn. Kaj la lastan tagon li malaperas murmurante, kritikante la faritan elekton pri la sidejo de la venonta kongreso.

La politika kongresano, kiu revas nur pri parlamento, partioj, proponoj k. t. p. —Li portas ĉiam sub la brako grandan paperujon kun dokumentoj, projektoj, broŝuroj. Li alkondukas vin en angulon por malkovri al vi grandan sekreton. Li estas aŭtoro de vasta projekto por organizado de Esperantistaro. Ĝis nun oni parolis nur pri Tera Esperantistaro; sed oni scias, ke kredeble oni povos baldaŭ interrilatiĝi kun aliaj planedoj. Tiutempe la propagando estos ne sole nacia, ne sole internacia, sed ankaŭ interplaneda. Oni do devas nun pensi pri la kreado de centra organizo, por la tuta suna sistemo. Tiu ĉi centra organizo bezonas oficejon, sekretariejon. Sed ekzistas jam tute preta oficejo, la Centra oficejo, kiu plene konvenas por la rolo de Sunsistema Oficejo, pro la multaj aŭtobusoj pasantaj antaŭ la pordo.

La mallaborema kongresano, kiu venis al la kongreso por ripozi kaj,—ripozadas. Li leviĝas tre malfrue, bone ĝuas la matenmanĝon, kaj ĉirkaŭ la dekunua iras al la Akceptejo. Li babilas en la koridoroj, skribas kelkajn poŝtkartojn kaj je la unua iras por tagmanĝi kun samideanoj. Li longe babilas, trinkas nigran kafon kaj je la tria akompanas amikojn ĝis la pordo de l' kongresejo. Kelkafoje li eniras la vestiblon por fini babiladon. Li unufoje eĉ malsupreniris la ŝtuparon kaj rigardis scivole tra la pordo en la kongresan salonon. Sed la severaj mienoj de la estradaj sinjoroj lin timigis kaj li tuj malaperis. Dum la kunvenoj li promenas tra la urbo, aŭ, sidante en publika ĝardeno, legas nacian gazeton. Li konas ĉiujn kafejojn aŭ sukeraĵejojn de la kongresa urbo, japanajn kaj ne japanajn, sed havas nenian ideon pri oficialaj institucioj.

La ĝenerala specialisto, ano de ĉiuj societoj, ligoj aŭ asocioj. Li ĉiam kuras kun programo en mano, ŝvitante kaj viŝante la frunton. Li ĉagreniĝas, tial ke okazas samtempe kunvenoj de katolikoj kaj liberpensuloj, bankistoj kaj socialistoj, farmacistoj kaj juristoj. Li estas en stranga embaraso; ĉu li estas pli socialisto ol bankisto aŭ pli bankisto ol socialisto. Ne trovante solvon de l' problemo, li eniras la kunvenon de maristoj (li neniam vidis maron), kie oni lin enskribas en la societon de la Amikoj de la Maro.

La kolektista kongresano, kiu kolektas ĉiujn librojn, ĉiujn paperojn, ĉiujn afiŝojn rilatantajn Esperanton. Li abonis ĉiujn Esperantajn gazetojn aperintajn kaj malaperintajn.

Li havas la sola konatan ekzempleron de la Groenlanda Esperantisto presita ĉe la Norda Poluso mem sur foka haŭto. Li posedas ankaŭ la bonan eldonon de la verkaro de Devjatnin, tre maloftan, tiun, kiu enhavas multe da preseraroj en la Antaŭparolo. En ĉi tiu momento li estas tute ĉagrena; li vidis en la mano de samideano prospekton pri iu Esperanta botpoluro, kiu mankas en lia kolekto kaj li nenie povas ĝin trovi. Li petas la maloftajn de ĉiu oficisto, de ĉiu vendisto, kaj fine, ho feliĉo! sur la strato li ĵus ekvidas unu iom makulitan de koto. Zorge li ĝin prenas, stampas per sia marko kaj enskribas en la katalogon kun numero 364523.

La kongresano, kiu elpensis novan vorton, terura viro, kiu vin prenas per butono de jaketo, vin puŝas en angulon de koridoro, kaj ne volas vin liberigi. Vane vi konstante jesas, vane vi oscedas, vane vi rigardas la poŝhorloĝon. Li daŭrigas malvarme la pruvadon. Esperanto estas perfekta, per ĝi oni povas esprimi ĉiujn nuancojn de l' penso krom unu; Esperanto havas ĉiujn kvalitojn, ĝi estas logika escepte pri unu punkto. Kelkafoje la kongresano, kiu elpenses novan vorton, kaptas alian elpensinton. En tia okazo ambaŭ parolas samtempe ne aŭskultante unu la alian.

Fine **the last but not the least**, kiel diras niaj britaj samideanoj.

La kongresano, kiu scias nenion pri Esperanto, krom la nomo Esperanto.

Vi ridas, vi diras ke mi estas ŝerculo, mensogulo. Mi juras, ke ĉi tiu speco ekzistas. Mi vidis la solan ekzempleron ĝis nun konatan per miaj propraj okuloj. Li havas du krurojn, du brakojn, du okulojn kaj unu buŝon, el kiu neniam eliris iu ajn esperanta vorto.

La dirita kongresano kutimas dum sia libertempo ĉeesti ian ajn kongreson por amuziĝo. Li legis en la gazetoj pri la Danciga Kongreso kaj tuj aliĝis. Li alvenis Dancigon kaj estis tute mirigata. En ĉiuj aliaj kongresoj oni parolis diversajn lingvojn kaj li povis kompreni la paroladojn faritajn en sia propra gepatra lingvo. Nun en ĉi tiu esperanta kongreso li povas nenion kompreni, ĉar ĉiuj parolas la saman lingvon, tute ne konatan de li. Kia ridinda kongreso! Li pensis, ke oni faros paroladojn por klarigi, kio estas Esperanto. Sed tute ne, oni nenion klarigas, oni nur uzas la lingvon. Kia stranga kongreso! . . . Kelkaj samideanoj donas al li ŝlosilon. Li legas la frazon pri artikolo, kritikas la unuecon de ĉi tiu, kritikas kelkajn radikojn de la vortaro, deklaras ke al Esperanto ĉiam mankos literaturo, kaj malaperas, jurante, ke neniam li ĉeestos denove esperantan kongreson.

(Lingvo Internacia)

KIEL NI DEVAS TRAKTI NIAN LINGVON?

(Laŭ artikolo en L. I.)

La ĉefa merito de Dro Zamenhof kuŝas malpli en la kreado de la lingvo mem, kiel ajn genia ĝi estas, ol en lia ideo kaj volo,—kiu Esperanton vivigis tuj de la komenco,—ke ĝi devis evolui kaj pliriĉiĝi same, kiel iu ajn natura vivanta lingvo.

Jen la esenca kondiĉo de ĝia forto kaj de ĝia supereco rilate al aliaj artaj lingvoj.

Vivante mem nian lingvon, ne diskutante ĝin, ni ĝin vivigis.

Ni daŭrigu tute trankvile kaj plejkonfide!

Esperanto ekzistas per si mem. Ĝi ne estas "kritiko" de la naciaj lingvoj, kvankam ilin ĝi superas dank' al sia facileco.

